

FEB 4 1920

AMERIKA ESPERANTISTO

DECEMBER, 1919



SEE PAGE 15, IMPORTANT

OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., room 124, Chronicle Bldg.
F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Society, Group No. 1. Room 13, Tooke Bldg., St. Catherine St. Meets Wednesday evening at 8.00 o'clock.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Kbluo meets every Saturday, at 8.30 P. M., at Room 313, Y. M. C. A. Bldg., 1736 G St., N. W., Washington, D. C.
Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month except July and August at Public Library. Club meetings each Wednesday evening except third at 20 Randolph Place, N. W. All Esperantists invited.

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place.
La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave.
Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 120 29th St.

MANCHESTER, N. H.

Pionira Grupo. Sek., Daisy E. Flanders, 714 Beech St. 19

HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizu grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvarmonate .25.)
Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

BUFFALO, N. Y.

Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, Miss Leonora Stoepler, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barĉo, or Esperanto super, is held on the THIRD FRIDAY of every month (6.30 P. M.) Information from secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenasardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

Published Monthly by

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)
WEST NEWTON, MASS.**

One Dollar a Year.

Du Spesamiloj Jare.

Single Copy Ten Cents.

VOL. 25

DECEMBER, 1919

No. 3

THE XII WORLD CONGRESS

Spread the glad tidings! We have received the following news: the Twelfth Universala Kongreso will take place Sept. 1 to 7, 1920 at the Hague, Holland. It is a crisis for the world: a well attended congress may mean ———, what may it not mean? Let's think it over, and whether we can financially "afford it" or not, let's be there.

DEK-DUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Al la tutmonda samideanaro!

Post interkorespondado kun la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la Hagaj Esperantistaj societoj decidis akcepti la inviton, okazigi la dek-duan Universalan Kongreson de Esperanto en nia registara urbo 's-Gravenhage (Esperante: Hago), dum la somero 1920.

Komprenoble, ni ĉiuj interkonsentas, ke la ĝenerala spirito de l'unua postmilita Esperanto-kongreso (preparata en nelonga tempo) ne estos simila al tiu de niaj antaŭaj grandiozaj kongresoj. Sed kiu venos Hagon por antaŭ ĉio viziti laborantan kongreson celantan la restarigon de niaj internaciaj interrilatoj kaj la reorganizon de nia movado, tiu certe ne bedaŭros sian vojaĝon.

Al la K. K. K. estas submetataj por aprobo la jenaj decidoj:

1e okazigi la kongreson en la unua semajno (1—7) de septembro 1920;

SEE PAGE 15, IMPORTANT

2e fiksi la kongreskotizajon je 10 Nederlandaj guldenoj;

3e permesi, ke samideanoj el landoj kun malfavorega kurzo je Nederlando (ekzemple Germanio, Aŭstrio, Belgio, Francio, ĉiuj novaj Eŭropaj ŝtatoj, k. c.) pagu siajn kotizajojn ekstreme en majo 1920, kiam supozeble la diversaj malaltaj kurzoj almenaŭ iom estos plibonĝintaj;

4e formi garantian fundon per enskriboj po 25 guldenoj.

Karaj gesamideanoj

Jen la unuaj komunikoj pri nia dek-dua. Depost kiam vi estos leginta ilin, eklaboru por nia kongreso, por ke ĝi fariĝu sukceso! Ni kalkulas je almenaŭ 400 kongresanoj diversnaciaj, kaj samideanoj el landoj kiel Grand-Britio, Svisio, Hispanio, Skandinavio kaj Nord-Amferiko jam nun sendu siajn kotizajojn (mondonacojn krome ni ankaŭ ne malŝatos!) por faciligi al ni la preparadon kaj aranĝadon de l' kongreso. Monsendojn oni faru rekte al la **Residentiebank** en Hago (do ne al la kasisto), kiu malfermis kongreskonton.

Kun samideanaj salutoj,

J. L. Bruijn,
Sekretario de l' Loka Kongreskomitato.

STRANGAJ INDIANAJ MOROJ

en Argentino

Ce la indianoj "Matakoj" kaj "Ĉirigŭanoj," oni havas kiel laboro ĉasadon de leonoj, leopardoj, kajmanoj kaj papagoj. Ili ĉiutage foriras por ĉasi disite en grupoj po ĉirkaŭ 50 viroj. La pioniroj estas la plej bonaj sagistoj; ili esploras la kampon. Dum mia ĉeesto ĉe tiuj gentoj, preskaŭ ĉiutage oni mortigis okdek diversajn bestojn, kiujn oni portis al la gentejo; tie la virinoj senhaŭtigis la bestojn, por pli poste vendi la haŭtojn en la malproksimegaj urbetoj (eĉ la urbeto plej proksima al la gento oni nur atingis rajdante sur ĉevalo naŭ tagojn de vojaĝo. Krom la ĉasado, mi devas rimarki ke la viroj neniam laboras; ĉiujn la laborojn aliajn la virinoj plenumas.

Ce ili troviĝas la kutimo, kiam mortigis iu persono el la gento, enterigi la korpon tiamaniere: se la mortiginta estas junulo aŭ maljunulo oni ĝin enterigas starata, kovras ĝin ĝis la kolo per tero, lasante for de la tero la kapon, malkovrita, tiamaniere ke la korvoj ĝin manĝos: la infanojn oni enterigas kuŝataj, kovras ambaŭ korpon kaj kapon per tero, lasante la dekstran manon for la teron, por ke ĝi simile estu manĝota de la korvoj. Tiu kutimo apartenas al ilia religio.

Kiam mortigas iu, la tuta gento festas grandan feston kiu daŭras tri "sunojn" (tagojn), sed kiam naskiĝas iu, ĉiuj la indianoj estas malgajaj, ploremaj, kaj malbenas la stelojn — laŭ la indianoj, la steloj estas simbolo de fiaĵo pri la naskiĝo.

Ili havas aliajn morojn sed ne rimarkindajn. Alian okazon mi skribos ion pri la indianoj de tiu ĉi nacio, Bolivio.

Higinio Garcia, Estarca, Bolivia
daŭrigata de la marta A. E.

LA RONDO FAMILIA

(Oni proponas uzi tian paĝon por aferoj interesaj al la mondesperantistaro. Kompreneble, ĝi concernos statistikon, kiu helpos respondi al la ofta demando de la ne-esperantistoj: "Kiel progresas la lingvo?" Bonvole precizigu ĉiujn la donatojn, ĝis la fina cifero.)

Pro la decido okazigi la Mondkongreson ĉe La Hago en aŭgusto de la nuna jaro, estos ŝatindege, se en antaŭa Am. Esperantisto, oni povos havi multe da informo pri la progreso de la movado en multaj landoj, helpajn rekomendojn pri tiaj gravaj kaj esencaj aferoj kiaj grupkonduko, instruo por komencantoj, meminstruado, komercaj uzoj, ktp. Car, kompreneble, plejparte, tiuj metodoj kiujn oni trovas utilaj en unu loko ankaŭ estos utilaj en aliaj lokoj, eĉ se ne ĉiuloke. Ekzemple, en Bostono, ni ofte trovas intereson en diskutado pri la uzo de kelkaj vortoj aŭ frazoj, aŭ traktas historion, komparante niajn esprimojn kun tiuj de la verkinto.

Afero kiu promesas vigliga, estas la propono festkonveni la kvinan sabaton de monato. (Dum 1920 tiuj sabatoj okazos jan. 31, maj 29, jul. 31, kaj okt. 30. La tri tiaj kunvenoj kiujn ni havis en 1919, pruvis tre ŝatindaj. Por jan. 31 ni atentis ĉefe al nia klubaj spertuloj; sed por maj 29a ni proponas gastigi multe da Bahaanoj de nia ĉirkaŭaĵo, kaj eble doni premiojn al tiuj kiuj laŭ la deziro de Abdul Baha plej sukcese lernis nian karan lingvon. Eble la 29a de julio estos dum la amerika jarkongreso, kaj tial estos granda festena tago).

LA DEVENO DE LA TABAKO

En la Fundamenta Krestomatio, oni povas legi araban legendon pri la naskiĝo de la tabako. Car la tabako efektive estis unue uzita de la amerikaj indianoj, eble ilia legendo pri ĝia deveno estas rakontinda.

Konata aŭtoritato pri indianaj aferoj, Henry A. Schoolcraft, skribis jene:

Pri la sankta deveno de la tabako, la indianoj ne dubas, kvankam pri la detaloj kiamaniere la netaksebla benaĵo estas donita al la homaro preskaŭ neniuj gentoj precize interkonsentas. Esence, tamen, la legendo estas sama je ĉiuj:

Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la spiritoj ankoraŭ opiniis ke la mondo estas sufiĉe bona por iafoje tie loĝi, tre forta kaj potenca spirito ekkuŝis apud sia fajro en la arbarego, por dormi. Dum li tiel dormis, lia ĉefmalamiko alvenis, kaj opiniis ke estas bona okazo por fari malbonfaraĵon; tial, kviete alveninte al la dormanto, li rulis lin al la fajro, ĝis kiam lia kapo kuŝis inter la ardantaj fajrrestaĵoj, kaj liaj haroj ekflamiĝis. La muĝo de la fajro en liaj oreloj ekvekgigis la bonan spiriton, kaj, ekstarante, li kuregis, timigita, tra la arbarego. Samtempe, la vento kaptis liajn bruligitajn harojn tiam, kiam ili defalis, kaj forportis ilin kaj semis ilin ĉie en la tero. Tie ili eniris la teron, enradikiĝis, kaj kiam ili elkreskis, jen la tabako.

Tradukis W. D. Witt.

LA DU VIVOJ DE ROBERT MALCOLM

Edward J. Parshley

Morgaŭ en la elektra seĝo mi suferos mortpunon, kiun la leĝo postulas pro mia krimo, kaj tiu puno estos justa. Tamen dum mi skribas la vortojn, mi miras ĉu ili estas veraj. Ĉu estas justeco, kiam homo mortigas pro ago, kiun elfari li havis nenian volon. Ĉu estas postulate, ke la memoro de solena promeso, senpripense farita, daŭriĝu senkonscie tra la centjaroj ĝis tiam kiam ĝi fine plenumiĝas? Mi nur scias, ke tio estis postulata rilate min, kaj pro tio morgaŭ mi devas mortiĝi.

Estis sensacio kiu plenigis la tagjurnalojn per preskolonoj mal-lume skribitaj, kiam oni juĝe ekzamenis kaj kondamnis min, Robert Malcolm, pro primeditita mortigo. Mia proceso konfuzis leĝistojn, alienistojn kaj kriminalistojn. Nenian motivon oni povis trovi por la antaŭmeditita pafigo je homo tute nekonata, sur la strato en plena taglumo, kaj mia propra freneziga persisteco, ke mi estas senkulpa malgraŭ la atesto donata de okulvidintoj, estis la plej konfuziga aspekto pri ĝi. Frue oni insistis, ĉefe mia propra advokato, ke mi estas normala intelekto. Tial oni kondamnis min al mortpuno.

Sajnis al mi, ke ĉiuj homoj estas aŭ mensogantoj, aŭ ke ĉiuj escepte min estas senesperinde frenezaj. Kiam mi aŭdis amikojn jure atesti, ke ili vidis min kiam mi mortigis kunhomon, mia sola penso estis, ke mi estas viktimo de abomena konspiro. Mi sciis, ke tian agon mi ne faris. La viron kiun mi laŭdire mortigis, mi neniam antaŭe vidis, kaj mi estis absolute certa, ke mi lin ne mortpafis. Tamen, tiuj, kiujn mi konfidis, atestis ke ili vidis min, kiam mi tion faris.

Se mia vivo, anstataŭ finiĝi morgaŭ daŭrus eĉ tiom mallonge, kiom tiu de la Vaganta Hebreo, estus al mi nepoveble forgesi tiun posttagmezon. Mi memoras, ke kune kun la rotanoj de la Nacia Gardistaro mi ĵus revenis de la pafejo kie okazis pafekzercado, kaj mi haltiĝis proksime al mia loĝejo por babiladi kun amiko. Estis en bela tago malfrue en Majo kaj homoj sidis ĉe malfermitaj fenestroj, aŭ kolektiĝis sur verandoj. Pri kaŭzo, kiun mi nun ne povas rememori, ĉe la pafejo mi ne entute malplenigis la kartoĉujon de mia pafilo kaj mi diris al mia amiko, ke mi ne forgesu eligi la kartoĉojn, kiam neatendita sveno ekkaptis min. Ĝi preskaŭ tuj forpasiĝis, kaj mi estus eldironta ridigajn vortojn, kiam la mieno de teruro kiu aperis sur la vizaĝo de mia amiko haltigis mian paroladon.

"Io okazis," mi diris. "Ni transiru kaj esploru."

Mi direktis min trans la straton, sed mia amiko ne akompanis min. Kiam mi alproksimiĝis, la popolamaso sin flankeniris por mi, kaj mi vidis kuŝantan sur la trotuaro viron mortpafitan, kun kuglotruo en la kapo.

Policano rapide alproksimiĝis kaj jetis sur la korpon ekrigardon.

"Kiu mortpafis tiun viron!" li ekkriis.

Duondekduo da homoj almontris min, kaj eldiris hore "Li tion faris."

En tiu momento frapis min pli ol io alia, la senceco de la afero. Mi memoras, ke mi ne estis tre maltrankviliganta. Kompreneble mi ne mortigis la viron kaj estus sufiĉe facile por starigi pruvon pri tio. Mia socia rango mem estas preskaŭ senkulpigilo.

Sed tio, kio okazis estis preskaŭ nekredibla. Ne nur pri mia senkulpeco oni ne povis esti konvinkita, sed amikoj kaj proksimuloj kunigis por kulpigi min. La viro kun kiu mi estis parolinta, eldiris la rakonton kiu al mi ŝajnis esti la plej abomena mensogo el ĉiuj. Li rakontis, ke ni diskutadis najbarajn aferojn, kiam subite mi prenis sur min esprimon de nepriskribebla furiozeco. Li aŭdis min ekkrii per lingvo al li tute nekomprenebla, kaj viro kiu ĵus aperis ĉe la stratangulo ekrigardis min. Mieno de terurego surfluis la vizaĝon de la nekonatulo kaj tuj poste mi mortpafis lin. Aliuloj atestis pri la pafigo kaj juĝantaro estis devigata kondamni min.

Mi ne penos priskribi mian spiritstaton. Estis mirindaĵo, ke mi ne efektive frenezigiĝis. Ŝajnis al mi ekster la limoj de ebleco, ke io tiel terura povis okazi. Mi sciis, ke mi estas senkulpa, tamen mi aŭdis gevirojn honorindajn laŭ mia opinio, kiuj forjuris mian vivon.

Mi scias nun, tamen, ke tiuj atestantoj diris la veron ĉe la juĝa esplorado. Ĉio komprenebliĝis al mi en la hieraŭa vespero. Estis preskaŭ la dekdua horo kaj mi ne povis dormi. Mi sidis sola en la malluma ĉambro de la karcerio, kiam la malproksima muro ŝajne disfendiĝis.

Tra la aperturo aperis arbara maldensaĵo meze de kiu staris viro nekutime vestita. Lia vizaĝo estis duone turnite al mi, kaj mi rekonis lin. Certe mi ne povis fari alie ol rekoni tiujn vizaĝtraĵojn, ĉar ili apartenis al tiu, kiun mi vidis mortigitan ĉe la sortdestinata stratangulo, antaŭ multe da monatoj.

Leviĝante de kuŝanta pozicio kaj apogante sin sur la kubuto, estis alia viro, kaj liaj vizaĝtraĵoj tute similis la miajn. Sur lia vizaĝo montriĝis kolero kaj malamo, dum la vizaĝo de la rekte staranta viro vidigis triumfon. Estis tiu, kiu parolis, kaj kvankam liaj vortoj estis esprimataj per lingvo nekonata, ilia signifo per stranga kaprico de la memoro estis komprenebla al mi.

“Denove ni renkontiĝas kaj mi venkas,” diris la viro. “Facile mi povas mortigi vin, se mi volus, sed kian profiton mi elgajnos per tio. Morgaŭ mi ekvojaĝos sur longa vojaĝo, kaj neniam denove ni renkontiĝos. Pro tio, kial ne mi permesas, ke vi vivu?”

Li, kiu portis mian vizaĝon kaj figuron, parolis per voĉo sufokigita de furiozeco:

“Jes, vi venkis,” diris li. “Sed mia tago venos. Vi diras, ke denove ni ne renkontiĝos, sed vi eraras. Ni nepre renkontiĝos, kiam kaj kie, mi ne scias; sed tiom certe, ke la suno brilas, vi denove renkontos min. Kaj kiam unu fojon pli ni troviĝos vizaĝo kontraŭ vizaĝo, tiu tago estos mia triumfa tago kaj mi mortigos vin. Akceptu ĉi tion kiel antaŭsciigon, ĉar alian vi ne ricevos.”

La neordinara bildo malaperis kaj la muro fermiĝis, sed mi scias, ke mia antaŭdiro esprimita antaŭ eble milo da jaroj efektiviĝis, kaj mia promeso estas plenumigita. La vidaĵo de mia malnova malamiko,

en momento anstataŭigis min el obeema civitano de civilizita lando en nehumanulon kiu pensas nur pri venĝo; ĝi malestigis dum momento mian dudekcentjaran personecon kaj revivigis tiun homon, kiu mi estis dum epoko antaŭ longe forgesita en la estinteco.

Kaj pro tio, mi scias, ke morgaŭ mi estos juste punata—kaj denove mi miras. Ĉu homo estas devigata plenumi solenan promeson malpie faritan, eĉ kvankam dekdouo da vivoj estas travivitaj post la eldiro de tiu promeso? Verŝajnas tio, se mia travivaĵo estas tiu de ĉiuj homoj. Estas feliĉe konsolanta pripensado. Eble bono postvivos ankaŭ, kiel malbono, kaj laŭ tiu espero mi nun enskribas la solenan promeson, ke en kia vivo mi troviĝos post morgaŭ, mi klopodos fari repagon pro la ago pro kiu oni kondamnis min.

Permesita de la Verkisto,

el la angla tradukis
William H. Smith.

DEK DEMANDOJ

alfarita de La Espero, Aug.-Sept., 1919.

Propagandante nian aferon ni kutimas admonadi niajn samideanojn fari ĉion eblan por ĝi. Ofte ili ekĝemas kaj diras (aŭ pensas): “Kion mi faru? Mi tute ne povas fari ion.”

Al ĉiuj samideanoj mi nun volas fari dek demandojn. Se vi jese povas respondi ĉiujn, vi estas fidelulo, kaj mi kore dankas vin. Se vi ne povas jese respondi la demandojn mi diros al vi: “Vidu tie-ĉi kion vi **povas fari**. Vin plibonigu, kaj faru ĉion, kio tie-ĉi estas nomita!”

1. Ĉu vi apartenas al E. A. N. A., via loka klubo kaj U. E. A.?
2. Ĉu vi abonas tiun ĉi gazeton kaj ankaŭ eksterlandan esperanto gazeton?
3. Ĉu vi konstante legas ĉiutage iom da esperanta literaturo, tiamaniere pliperfektigante viajn lingvajn sciojn?
4. Ĉu vi provas varbi novajn anojn al nia afero?
5. Ĉu vi ĉiam kunportas esperantajn propagandojn kiam vi eliras?
6. Ĉu vi regule vizitas la kunvenojn de via klubo kaj fervore partoprenas ĝian agadon?
7. Ĉu vi ĉiam portas verdan stelon?
8. Ĉu vi ĉiam memoras alglui propagandan markon sur viajn poŝtajn sendaĵojn?
9. Ĉu vi parolas pri Esperanto kun viaj konatuloj?
10. Ĉu vi senescepte kaj frue respondas al viaj esperantaj korespondantoj?
11. Ĉu vi almenaŭ kvarfoje ĉiujare sendas vian novajon al Amerika Esperantisto? —tion ni pensis aldoni, sed ne!—kredeble nur sanktulo tion farus.

Kioma horo estas kiam la horloĝo sonas dektri? Jam estas la horo por ripari la horloĝon.

GLUSKAP KAJ LA INFANETO

Unu el la dioj de la Algonkinaj indianoj de Nord Ameriko, estis Gluskap. Multaj estas la legendoj pri ĉi tiu dio. Jen unu:

Gluskap, post kiam li venkis la Kevavkuojn, gento de gigantuloj kaj magiistoj, kaj la Mendulinojn, kiuj estis ruzaj sorĉistoj, kaj Pamola'on, malbona nokta spirito, kaj ankaŭ multajn diablojn, koboldojn, kanibalojn, kaj sorĉistinojn, sentis ke li ja estas tre potenca, kaj fanfaronis al unu virino ke neniu restis de li nevenkita.

Sed la virino ridis kaj diris, "Ĉu vi estas tute certa, majstro? Troviĝas ankoraŭ unu, kiu restas nevenkita, kaj nenio povas lin venki."

Gluskap, iomete surprizata, postulis la nomon de tiu potenca estaĵo.

"Lia nomo estas Vasis," respondis la virino; "Sed mi forte konsilas ke vi neniel rilatigi vin kun li."

Vasis estis nur infaneto, kiu sidis sur planko, suĉanta pecon da acersukero kaj murmurkanta al si mem. Nu, Gluskap ne estis edziĝinta, kaj tute nescias kiamaniere infanoj estas regataj, sed kun infaneto ridetis z(jiefid ujna uojnefar jire... poaohE ...sifig IN INN plena memkonfido li ridetis al la infaneto kaj postulis ke ĝi venu al li. La infaneto ree ridetis al la postulanto, sed ne moviĝis, kaj Gluskap imitis la belan kanton de unu birdo. Vasis, tamen, ignoris lin, sed daŭrigis la suĉadon de sia acersukero. Gluskap kiu ne estas alkiutimiginta je tiu traktado, furioziĝis, kaj per teruraj kaj minacaj vortoj, ordonis ke Vasis tuj rampu al li. Sed Vasis ekploregis per teruraj kriegoj, kiuj tute malaŭdigis la vortojn de la dio, kaj spite ĉiuj minacoj de la dio, li ne ekmoviĝis.

Gluskap, nun tute ekscitigita, uzis ĉiujn siajn magiajn povojn. Li deklamis la plej terurajn ensorĉilojn kaj la plej timindajn subvenkilojn. Li kantis la kantojn per kiuj oni vekas la mortintojn, kaj tiujn kiuj forpelas la diablon ĝis la plej profundaj partoj de la infero.

Sed Vasis ŝajne sendube opiniis ke tio estas ia ludo, ĉar li nur lace ridetis kaj aspektis enuigita.

Fine Gluskap, malespere, elkuris el la tendo, kaj Vasis, sidante sur la planko, kriis, "Gu! Gu!" triumfe. Kaj eĉ nun, la indianoj diras ke kiam infaneto krias "Gu!" li rememoras la okazon kiam li venkis la potencan Gluskap.

el "Myths and Legends of the North American Indians,
de Lewis Spence,—tradukis W. D. Witt.

Patrino,—demandis Jonĉjo—Ĉu misiistoj ĉielen iras?

Nu, sendube, karulo,—respondis lia patrino.

Ĉu kanibaloj ankaŭ?

Ne, ili ne iras, bedaŭrinde.

Tamen, patrino,—insistis la bubo—se kanibalo mangas misiiston, li devos iri, ĉu ne?

el Boston Ideas—trad. Prujno.

DEMOKRATECO AŬ OLIGARĤIO KAJ ANARĤIO

La milito ŝajne estas lasinta baraktemecon ĉe multaj: eĉ Esperantujo ne tute evitis la malakordon. Pacemuloj, ni devas nin mem reteni for de la koleriĝo. Nun estas venonta kongreso. Ni esperas ke ĝi plene sukcesu. Pro tio ni devas zorgeme juĝi la faktojn kaj severe antaŭpensi agadon antaŭ la kongreso. La nova Internacia Asocio Esperantista voĉdonita de la 9a kongreso ekfunkciu bone.

Okazis septembron konferenco en Paris; tiu konferenco enhavis kelkajn eminentulojn sed ne estis aŭtoritata(?). De ĝia oni eble povas profeti la probablan estontan agadon de la Lingva Komitato kaj aliaj oficialaj institucioj. Ni ricevis per Oficiala Gazeto, okt. 1919, la sekvantan sciigon.

“La Konferenco deziras

“Ke, la redaktantoj de gazetoj kaj oficialaj eldonaĵoj, ne enkonduku la uzon de io anstataŭ ujo, sen oficiala decido de la Lingva Komitato.”

Ĉu la redaktantoj de gazetoj devas ankaŭ anstataŭigi io'n per ujo?

Tio estas, kompreneble, afero de opinio, kaj ni devas tie ĉi averti al niaj legantoj ke de la komenco redaktoro Scott protestis kontraŭ anstataŭigon de ujo per io, tamen, mi opinias, ne deziris ke ni anstataŭigu io'n per ujo. Mi opinias ke nun, pro la agado de tiu konferenco kaj eblaj erarkomprenoj pri ĝi, estas nia devo al niaj legantoj iom klarigi la aferon por ke ili povu komprenintaj uzi aŭ unu aŭ alian formon. Se oni timas eventualan hereziigon, oni uzu nur lo ujo'n; mi mem prokrastas tian decidon.

Sajnas al ni ke oni ankoraŭ mankas klaran oficialan certigon pri la fakto. Eble tro ofte pri Esperanto oni povis diri, “Une main invisible a tout arrange.” La fakto ŝajnas al mi, iomete studinta, almenaŭ dubinda. Pri la komisio de S-ro Moch oni povas legi en la Esperantista Dokumentaro, en kajero IV (pri la 2a kongreso) pp. 11, 34, §2; en kajero VI (pri la 3a) pp. 56, 57, 59, 60; en kajero XII (pri la 4a) pp. 56, 73, 74 §3. Sajnas al mi sufiĉe evidente ke S-ro Moch ricevis plenan komision pri la propraj nomoj, aŭ plibone diru, ke neniu alia komisiito ricevis pli laŭlegan komision pri io. Oni scias ke la limoj al la rajteco de la Lingva Komitato mem estis tiam iom dubindaj. Pri tiu rajteco oni povas trarigardi E. D. en kajeroj I, pp. 18, 24, 31 (ankaŭ en Detala Raporto de Schneeberger pp. 56, 57); IV, pp. 19, 21, 33, 34, 35; XII, pp. 1, 20, 43, 67, 68.

Dum la jaroj 1895—1908, nia movado rapide trafluis la mondon, multaj varbitoj tute ne lernis la lingvon kaj oni ofte avertis al varbato ke eble efektiviĝus ŝanĝetoj. Kontraŭ tiu nespertularo oni devis starigi barilojn, la Lingvan Komitaton (el verkintoj), la Bulonjan Deklaracion, netuŝeblecon.

Netuŝebleco estas dogmo sendube necesa por starigi artefaritan lingvon, sed netuŝebleco povas esti tro ekstrema. Ni nun estas perdintaj multajn fervorajn samideanojn, kiuj tute ne ŝatis la ŝanĝojn proponitajn aŭ de S-ro Ido aŭ de S-ro Antido, sed kiuj pli malŝatis la sekretecon kaj la malrapidegan agadon de la Lingva Komitato.

Ni perdis S-ron de Beaufront, dum kelkaj jaroj la plej eminentan Esperantiston krom la Majstro. Ni perdis S-ron de Saussure, eble la plej eminentan kontraŭulon de Ido. Ni ne ploru tiujn perdojn, sed ni bedaŭras la eksamideojn kaj eminentulojn kiuj tiam decidis forlasi Esperanton, kaj la tutan movadon por internacia lingvo. Ĉu vere ni nun deziras perdi aliajn eminentulojn, kiuj sekvas la konsilojn de la bedaŭrata Boirac?

La respondaro pri la propono de S-ro Moch, ŝajnas al mi, estis, ne privata sed oficiala afero, la rekomendo de S-ro Boirac plene laŭleĝa, kaj la agado de U. E. A. pri tio, tute ne mallaŭdinda. (Ĉiuj samopini-as, verŝajne, ke tiu voĉdonado tute ne delokigis aŭ malpravigis la ujo formon, sed laŭ iuj ĝi permesis uzi la io formon).

Mi estas trovinta nur tri laŭ mi valorajn argumentojn kontraŭ la io formo: (1.) ke S-ro Moch, kaj eble multaj io-istoj pliposte forlasis Esperanton — tio ne, ŝajnas al mi, ŝanĝigas la leĝajn faktojn; (2.) ke la Fundamento estas absolute netuŝebla al Lingvo Komitato aŭ al iu alia — tion eble oni povas kredi, sed tion verŝajne ne kredis D-ro Zamenhof kiam li diras (XII, p. 43):

“La Bulonja Deklaracio malpermesas nur, ke apartaj personoj rompu la lingvon arbitre, ĝi estas kreita nur por gardi la ekstreme necesan kontinuecon en nia lingvo.”

(3.) ke la Fundamento estas per tiu ŝanĝo tuŝata — Sendube, ni iom ŝanĝas Fundamenteron kiam ajn ni aldonas novan vorton al la vortaro, ĉu ne? Ĉiu progreso estas ŝanĝo. Ĉu Turkujo (aŭ Aŭstrujo) restas sama kiel la Turkujo de la Fundamento. Ne, la milito tuŝas la Fundamenton. Neniu progreso devas malpravigi aŭ ‘mis’komprenebligi ion ajn el la Fundamento. Jen valora dogmo de netuŝebleco.

Mi esperas ke oni povas baldaŭ trovi metodon interkonsentigi la diversajn opiniojn. Jen sugesto! En la Fundamento oni uzas la formojn Hispanujo, Turkujo, Prusujo, ĉiu por “la lando de” hispano, turko, pruso. Sed en urboj de multaj landoj troviĝas anoj de fremdaj nacioj; ekzemple, en New York loĝas multaj italoj. Kie ajn loĝas italoj (parolaj kaj kulturaj) oni nomu la regionon italujo (laŭ la angla “Little Italy”); kie loĝas francoj, kiel en Quebec, Kanado, oni nomu la regionon francujo. Tia nomo enhavus la landon devenan, ekz. francujo enhavus “Fraancio”n, la historian regionon, sed ĝi enhavus la regatajn landojn nur se francoj tie loĝas. Kontraŭe, “Francio,” la historia kaj politika unuo de regado hodiaŭ enhavus Korsikon, Algerion, Anamon, kaj Madagaskaron, ktp. Laŭ tio Hindujo estus parto el Britio sed ne el britujo; (pri Irlando ni ne diskutu).

Pri la agado de Amerika Esperantisto en la afero; (1.) mi devas konfesi bedaŭratan anstataŭigon de ujo per io en la aprila kajero, p. 14 Pliposte, ni ne anstataŭigis sed uzis la ujo’n se trovita; ankaŭ ni ne anstataŭigis (kiel kelkaj aliaj gazetoj) la io formon per ujo.

Tamen, mi ne deziras pritrakti tiun lingvan aferon kiun mi ne spertege komprenas. La afero nur de ujo aŭ io malmulte interesas min; mi esperas ke ĝi baldaŭ estu decidota; sed mi iom dubas pri la severeco de tiuj institucioj, la laŭleĝa Centra Oficejo en Paris, kaj la U. E. A. Centra Oficejo en Bern. Mi ne tute ŝatas la agadon de U. E.

A., ke ĝi uzas ĉiam la nomon "Centra Oficejo," kaj ŝajnas deziri estri la tutan Esperantan movadon. Sed tiu ne estas afero de netuŝebleco.

Mi opinias ke ni devas efektiviĝi la Internacian Asocion Esperantistan. Gi havas plenan rajton super la oficialaj decidoj kaj la tuta organizita movado. Mi opinias ke nun sub tiu demokrata regado, oni povus klare doni al la Lingva Komitato la rajton ke ĝi konsideru ion ajn. Gi gvidu, ne nur sekvu inkvizicie unu aŭ alian eminentulon. Ni sekvu. La plimulto de la Esperantistaro ne tro rapide pliperfektigos.

Norman W. Frost

KLIPLINGS

Italy's Esperanto movement is progressing rapidly in both Milan and Genoa. In Milan Esperanto Itala Revuo has appeared in 16 pages, mostly in parallel column. The city authorities of Milan are conducting courses and two classes of 27 and 41 pupils passed their examinations. The Genoa Esperantists are fervently at work. For the last three months the Genoa dailies have been publishing pro-Esperanto articles, notably favorable are "Corriere Mercantile," "Caffaro," "Il Cittadino," "Il Piccolo," "Il Lavoro" and "L'Azione." The Central Executive Committee of the Itala Esperanta Federacio, which is located in Genoa, is made up of Kav. Emilo Spallarossa, D-ro Vincenzo Soleri, Demetrio Achillini, Attilio Clavenna, Michele Arabeno, Ettore Managlia, and Giovanni Barni, the last two serve as secretaries.

The movement is alive and growing in Naples, Palermo, Potenza, Canicatti, Turino, Memfi, Sassari, Terni, Sampierdarena, Bari, Trieste, Bologna, and Placenza.

from Il Comitato Centrale Esecutive (Ettore Managlia)
and from Esperanto Itala Revuo

Genoa—the Volta commercial school has introduced Esperanto.

Blagovieshchensk—an Esperanto course with 20 pupils began in September at the Japanese military prison, led by Fritz Roebig of Frankfurt am Main. It is oral for lack of any books. "Please send us some old magazines, etc." Address Fritz Roebig, Blagovieshchensk on Amur, Siberia, Japanische Lager fur Kriegsgefangene.

Krasznaja-Rjehka—a card from Ignac Balka, a Hungarian officer, reads, "Pensu do al ni malfeliĉaj militkaptituloj, kiuj jam la sesan vintron suferas ĉi tie en Siberujo.—Transportu nin hejmen!"

Breslau—The Catholic Esperanto League of Germany met Oct. 4th and 5th, and despite the changed conditions there was a good attendance. (At present the league numbers over half the pre-war membership, tho propaganda has scarcely begun again).

Lodz, Poland—The Esperantists gave an entertainment and dance in the White Salon of the Grand Hotel on the 22nd of November. Germans, Poles and Hebrews were present. Among the numbers was a newly invented musical instrument played by H. Berman. On the 24th a talk was given for scholars and names taken for a new course at the Lodz High School

el Neue Lodzer Zeitung

The Minister of Commerce has consented to officially teach Esperanto in the Commercial School of Ferreira Borges. —Portugal

The World Salesman requests every firm using Esperanto to send without delay a statement of their needs and offerings which will be printed free of charge in the Esperanto department. They have in preparation a new address list of over 460 Esperanto firms thruout the world, to be sold for 5 Post Office reply coupons.

A Hungara Esperanto Servo has been founded in Budapest and Szedged to furnish to the Hungarian press political, cultural and scientific news received from abroad thru magazines or visiting Esperantists. The newspapers in return give credit to the Esperanto Servo.

In the last half year very efficacious propaganda has been carried on in Hungary despite the disturbed conditions. The People's Commissaries for public instruction published 25,000 and again 10,000 flyers in Esperanto and 5,000 propaganda stamps. Instruction in the language was on the same footing as the other languages in the evening free schools, and in the young men's houses, and was permitted in upper and middle schools. In the spring there were courses in 12 schools in Budapesth, and in March '35 courses began, the teachers being paid 15 kr. per hour. The Esperantists held Sunday excursions and June 1, a convention at the historic ruins of Aquincum. The Hungara Revuo was a Bolševist organ, hence is no longer appearing, but the Hungara Esperantisto, from which these notes are taken is now appearing after a half year's silence.

—from Oct. and Nov. H. E.

Some weeks ago we received an announcement of the foundation by U. E. A. del. K. Takahashi and some others of The Japana Esperanta Korporacio. They will use only Esperanto in their correspondence. They will export Japanese commercial products of all sorts (a list enclosed) and also plan to import products into Japan. All those interested please send catalogs, price-lists, etc. Address 70c Jamashitacho, Jokohama, Japan.

The last number of the Esperanto Monthly should be obtained by every Esperantist as it contains a long illustrated article upon Bialystok, the birthplace of Dr. Zamenhof, where first the master workman dreamed of another world, one tongue, one brotherhood.

OUR EXCHANGES

Esperanto Itala Revuo—per year 5 L., Milan, Italy, Via S. Maria, Fulcorina, 12. The November issue is a magazine of 16 pages, organ of the Itala Esperanta Federacio and the local Esperanto Domo, it is about half in Esperanto.

German-Pola Esperantisto—A trilingual propaganda monthly of 4 large pages, 3½M., A. P. Bromberg, Brenkenhoffstrasse No. 13c—The December issue is mostly German and Polish in parallel columns. The language question is just now a crying issue among the Germanic peoples of the new Slavic countries, and Esperanto has a strong appeal as a neutral middle ground. It's use in the schools and courts may be legalized to conciliate the opposing parties.

LA ENLANDA MOVADO

San Francisco, Cal.—Nov. 28 Mirzah Ahmed Zhoreb, persa eminentulo, donis publikan paroladon pri Esperanto patronatan de la lokaj Esperantistoj kaj Bahaianoj.

Philadelphia. La loka societo festis la datrevenon de la nasktago de Dro. Zamenhof, la 15an de dec., en la Hotelo Hanover. Ĉirkaŭ la manĝotablo sidis dek-ok "barĉanoj." Poste, en la kunvenosalono, D-ro Miller kaj S-roj Ware kaj Hetzel donis paroladojn pri la vivo kaj laboro de la Majstro; S-ro Endy deklamis kaj S-ro Heiss fortepiane ludis. La Hotelo Hanover, ĉe 12a kaj Arch Stratoj estas la nova, kaj eble daŭra, kunvenejo por la societo kaj oni kore invitas Esperantistojn trapasantajn la urbon viziti la lokon, ian kvaran vendredon.

Montreal, Quebec, Canada. Dec. 2, 1919, la Montreala Esperanto Klubo kondukis tre ĝuitan kartludon kaj balan vesperon ĉe Alexander's Halo.

New Llano, La. La Esperanto klaso de la Llano Kooperativa kolonio havas nuntempe libertempon kial ĝia instruisto malsaniĝis dum sia foresto de la kolonio.

Erie, Pa. Kelkaj dekoj el la studentaro ĉe la St. John's Kanty College estas lernantaj Esperanton de unu el la estroj.

Chicago, Ill. "Profeto nenie mankas honoron krom en sia propra lando." Ĉe Chicago Universitato klaso el kvar studentoj estas komencinta studi Esperanton kial unu el ili, studento hina, okaze preparolis tianomitan lingvon lernigita ĉe la Universitato de Pekin.

Washington, D. C. Nov. 1—Parolado de S-ro Morton ĉe W. C. T. U., Washington, D. C. elvokis gravan intereson.

Bridgeport, Conn., Nov. 5—Granda ĉeestantaro ĉe la Bridgeport Filozofia Societo aŭskultis paroladon kaj multe interesis. Oni aĉetis da libroj gramatikaj kaj vortaraj, kaj formiĝis klaso gvidota de F-ino Annie Rawlinson.

Worcester, Mass., Dec. 18—Ĉe la Bahai Halo paroladis S-ro Morton, sec. de la K. K. L. K., kaj S-ro Gleason, del. de la U. E. A. Oni disdonis propagandilojn.

New Haven, Conn. S-ino Dagmar Baggar el Bridgeport kondukas klason en Esperanto ĉe la Bahaianoj je New Haven.

New York, N. Y., Dec. 14—La Naskiĝtaga festmanĝado de la New York Esperanto Society okazis ĉe Hotel Endicott. Malgraŭ malfavorega vetero multaj ĉestis. Esperantistoj francaj, meksikaj, kaj rusaj troviĝis en la kunvenularo. Oni legadis el la verkoj zamenhofaj, ankaŭ diversaj anoj memorparoladis. F-ino Della Lincoln kaj S-ro D. A. Klajin estas gvidantaj klasojn.

Washington, D. C., Dec. 14—Publika kunveno ĉe W. C. T. U., biografian kaj aliajn paroladetojn de eminentaj Esperantistoj.

Portland, Me., — S-ro Robert Blackstone paroladis pri Esperanto frue en decembro ĉe la Filatela Societo. Li estas konstanta semanto por nia afero. Antaŭnelonge li paroladis al la studantoj de Sydney, N. S.

Little Rock, Ark.—Oni formis Esperanto klubon post konatiga parolado de S-ro Goodhue, Jan. 1. Jan. 8, E. E. Upton oni elektis prezidanto, Prof. Davis de la Univ. de Ark., vic-prez., W. E. Dewey, kas., kaj F-ino Lowe, sekretario. Kunvenoj okazos ĉiuĵaŭde je la 7:30, en la Publika Biblioteko: F. M. Goodhue instruas.

PRESS NOTICES

The Journal of Electricity, monthly number for Dec. 15, 1919, gives whole-hearted support to Esperanto in a full column editorial, an article from the U. E. A. "Esperanto," and best of all, Judge Daingerfield begins in this issue "Essentials of Esperanto," a regular course in parallel columns Esperanto and English. This journal is already known to all progressive English speaking Electrical Men; subscription \$2.50 per year in U. S., Mexico, and Cuba; \$3.25 in Canada; and \$4.00 elsewhere. Address Rialto Building, New Montgomery Street, San Francisco, Cal. We quote:

"'As a result of the telephone repeater and other technical advances, people in San Francisco or Portland will be able to talk over the telephone to Buenos Aires with utmost ease.' Nations are all neighbors now, and there apparently must be some common neighborhood currency of speech."

Yes, it's going to be up to the telephone centrals to meet a fact. Of course, if they prefer, the "heloulinoj" may learn instead Spanish, Russian, Japanese and Chinese. Maybe the wide awake Pacific Esperantists will get ahead of Europe, at that!

The Journal of Engineering gotten out by the University of Colorado has a fine article on "The Green Star" by Hyman Levine.

The Federal Employee, 1423 N. York Ave., N. W., Washington, D. C., (\$2.00 per year). The December monthly number had an excellent article on "An International Language" by B. P. Mann.

Portugal, (Sept.-Oct.) an illustrated magazine of commerce and industry in Portuguese is running a regular Esperanto column. Address, Travessa de S. Marcal, 44, Lisboa, 145, 1.º, subscription 500 reis.

Reality for December gives a great deal of space to Esperanto. The recent propaganda journey of Miss Martha Root about South America in the interests of Bahatism and Esperanto is awaking increased interest among the Bahai.

The Listener in the Transcript (early edition) for Dec. 24 gave us a good write-up showing the increasing use of Esperanto in the schools and elsewhere.

The Arkansas Gazette for Dec. 28 had an article on Esperanto, also news items about the new club on Jan. 2 and 9.

Other press notices include allusions in the Lititz Express and the Boston Post Sewing Circle.

Kiam anasino metas ovon, ŝi forpaŝas kiel se nenio estas okazinta.

Kiam kokino metas ovon, ĵen bruego, kion la tuta fojnebestaro ŝajne avidas partopreni. La kokino reklamas. Pro tio la multekosto de la kok-ovoj kaj ne de la anasaj.

NOTES

Please send in material for propaganda leaflets—not over 1000 nor under 500 words mostly in English. We at the Esperanto Office could no doubt compose some mediocre ones, but we want the best and plenty to choose from. All comers welcome. Something to convince a single set of people: say teachers, or boy scouts, or labor unions, or people who attend international congresses; whoever is a member of one of these groups can tell what arguments will make an impression. Remember, we bluestockings cant know everything, not quite.

Please send in news items for A. E. That job belongs to the local secretaries of every group of more than one member. We'll do our part. If any club or collection of Esperantists, having at least 5 subscribers to A. E., will send us a "cut" (kliŝilo) of their members, 100 screen or finer and of fit size for the magazine, we will give them the rest of 2 pages to tell in Esperanto about themselves. At the present price of engraving in Boston the magazine cant afford to pay for having cuts made from foto'es, but we do want to get better acquainted with the local groups, their faces, and their ideas. Remember this the next time you have a club kunveno or outing.

Send all News Items on a separate sheet of paper marked "for Amerika Esperantisto."

Our last issue owed the cut of the old man in the Overland to the kindness of the Accessory and Garage Journal of Pawtucket, R. I.

We would like to have material for a historical number to celebrate the 15th anniversary of the A. E. A., predecessor of the E. A. N. A., sent in, especially any facts not hitherto published concerning Esperanto activities in any part of North America before 1905.

A large and valuable collection of Esperanto books sent by the heirs of Mrs. Luders to Secretary Ernest F. Dow, has been presented by him to the Association. Some have been added to our stock, but the more valuable, including many specially bound volumes of foreign magazines, will for the present be retained at the Office as a collection.

We shall probably consolidate the next two monthly issues to help meet advancing printing costs and to catch up with our dating.

ESPERANTISTAJ FOTOGRAFANTOJ

Tio estas por vi!

Ĉu vi ŝatas fotografarton? Ĉu vi nemetiiste praktikas fotografon kiel agrablan okupadon?

Se vi deziras kolekti belajn fotojn kaptitajn de samideanoj el ĉiuj landoj kaj interŝanĝi ideojn, konsilojn, ktp., rilatajn al fotografado, aliĝu tuj al nova esperantista asocio, **Tutmonda Foto-Klubo**, kiu havigos al vi adresaron de ĉiunaciaj amatorfotografantoj. **Senpaga Klubo. Nenian kotizaĵon.** Petu tuj detalojn kaj aliĝu al S-ro Georges Chavand, 103 Bd. Poniatowski, 103, Paris, (XIIe).

GUARANTEE FUND

OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

Central Office, West Newton, Mass.

The Montreal Congress voted to continue for the coming two years, i. e., January 1, 1920 to December 31, 1921, the same system of Guarantee Fund as the one which lapsed Dec. 31, 1919 (see p. 6, July-August Amerika Esperantisto). Several subscriptions towards the new Guarantee Fund were made at that time.

With the third and last call on the Guarantee Fund expiring Dec. 31, 1919, a circular was sent giving details of the new fund and giving old subscribers the privilege of re-subscribing for the coming 2 years, It is with the greatest pleasure and appreciation we report that from this we have received a trifle over \$400.

Dues were increased under the new Constitution, but expenses are also increasing and a Guarantee Fund is necessary if the work of the Association is to be continued.

We now make a general call for subscriptions to the new Guarantee Fund.

Following the text of the pledge of the Philadelphia Congress the new pledge will read as follows:—

I hereby subscribe an amount not exceeding that set opposite my name to the Guarantee Fund of The Esperanto Association of North America for the purpose of covering expenses which regular receipts or donations do not meet, for each of the two years from January 1, 1920 to December 31, 1920 and from January 1, 1921 to December 31, 1921, on the following conditions:

1. The total subscriptions shall aggregate at least \$1,000 or all subscriptions shall be void.
2. Calls shall be made for payments only by the Executive Committee of The Esperanto Association of North America, and not over 25% of subscriptions shall be called for at any one time.
3. All assessments shall be on the pro rata basis.

Please note that calls under this pledge cannot be made until subscriptions have amounted to at least \$1,000: and that the larger the amount subscribed the smaller the percentage to be called for.

Will you subscribe for the coming two years, and for how much? (Please detach and return).

Ernest F. Dow, Secretary

Subject to the conditions named on Page 15 of Dec., 1919 Amerika Esperantisto, I hereby subscribe the sum of \$.....towards the Guarantee Fund of The Esperanto Association of North America for each of the two years from January 1, 1920 to December 31, 1920 and from January 1, 1921 to December 31, 1921.

(Signed)

(Address)

.....

Ciu Esperantisto devas legi

ESPERANTO

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
Internacia monata gazeto tute en Esperanto

16—20 paĝoj de plej bona teksto

Diverslanda kunlaborantaro

Direktoro: **HECTOR HODLER**

Enhavo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri nuntempaj internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturajoj. — Esperantismo: Artikoloj pri propagando kaj utiligo de Esperanto. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Oficiala informilo de U E A. — Lingvaj Studoj. — Anoncetoj, ktp.

Jara abono: Ordinara eldono, 5 Frankoj. Luksa eldono: 6.25 Frankoj
Senpaga specimeno laŭ peto

Administrejo: Museumsstrasse 14, **BERN** (Svisio)

“THE WORLD SALESMAN”

*A Monthly International Trade Journal published in Yokohama, Japan,
by an American concern, with sections in English, Russian,
Spanish, Japanese, Chinese and Esperanto*

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has a regular Esperanto Section and publishes the names of firms using the international language.

It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.

Advertising Rates on application. Subscription, \$4.00 per year.

HEAD OFFICE: 76, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.
HEAD OFFICE FOR THE UNITED STATES AND CANADA: NEW YORK CITY,
Roderic Penfield, Representative and Correspondent
182 WEST FOURTH STREET.

The COMMON COMMERCIAL LANGUAGE COMMITTEE
using the
INTERNATIONAL AUXILIARY LANGUAGE
ESPERANTO

is prepared to render economical and efficient service to manufacturers and merchants who wish to secure business in countries where it is not easily obtained by ordinary methods.

For further information address
James F. Morton, Jr., Secretary,
211 West 138th Street, New York City.